

PRI LA HOMA ANIMO

Ĉiu homo konsistas el korpo kaj animo. La korpon li ricevas de la gepatroj, kaj la animon senpere de Dio. Dio mem kreas la animon kaj kunigas ĝin kun la korpo.

I. La homa animo estas nemateria estaĵo

La homa animo estas nemateria estaĵo, tio signifas, ke ĝi ne estas materio kaj povas memstare, sen materio, ekzisti kaj agi.

Ĝi ne estas materio, tial ĝi ne etendiĝas, ne estas dividebla en partojn, ne subiĝas al la leĝoj de la materio, ekzemple al la leĝo de inercio.

Ĝi povas ekzisti kaj agi sen la materio; ĝi do ne estas materia, kiel materia estas la animo de la besto; la besta animo ne povas ekzisti kaj agi sen la materio; ĝi do ne estas substanco. Kiam mortas besto, tiam pereas ankaŭ ĝia animo. Sed la homa animo post la morto de la korpo, kiun ĝi vivigas, ekzistas plue kaj plenumas siajn agojn (pensas, volas, amas, malamas).

Kontraŭstaras niajn vidpunktojn la materialistoj; tamen ni scias, ke ilia principo estas malvera, do ankaŭ la sekvoj estas eraraj.

1. La atesto de la Sankta Skribo

Sendepende de tio, ĉu iu rekonas la Sanktan Skribon neerarebla aŭ ne, ni ĝin rekonas la vorto de Dio mem. Kaj la Sankta Skribo kontraŭstarigas la animon al la korpo kaj diras, ke kiam la homo mortas, lia korpo fariĝas polvo, el kiu ĝi estis kreita, kaj la animo revenas al Dio, kiu ĝin kreis. Legu la Predikanton (12, 7): Kaj revenos la polvo en sian teron, el kiu ĝi estis, kaj la spirito reiros al Dio, kiu ĝin donis.

Dio la Homo Jesuo Kristo diras: Kaj ne timu tiujn, kiuj mortigas la korpon, sed ne povas mortigi la animon: sed prefere timu tiun, kiu povas pereigi kaj animon kaj korpon en inferon (Mat 10, 28.) Oni do povas mortigi la korpon, sed la animon oni ne povas mortigi. Plue, la animo post la morto de la korpo povas suferi turmentojn en la eterna fajro.

Kial ankaŭ sankta apostolo Paŭlo deziras morti, por esti kun Jesuo Kristo? (Flp 1, 23).

Tial, ke li scias, ke post la morto vivos lia animo.

Klare estas, ke post la morto de la korpo la animo - laŭ Diaj vortoj - vivas, suferas aŭ ĝojas; ĝi do havas estadon kaj agadon memstarajn, sendependajn de la materio. La homa animo estas do spirita, nemateria, substanca.

2. La atesto de la homa intelekto

La homa intelekto ankaŭ rekonas la nemateriecon kaj memstarecon de la homa animo. La nemateriecon de la homa animo oni povas prui el la agado de la animo. Se tiu agado estas tia, ke ĝin ne povas plenumi la materio, klare estas, ke la homa animo estas nemateria kaj memstare ekzistanta. Kaj ĉu ne estas tiel? Ni pripensu la agadon de la intelekto unue.

a) Ĉiu rekonas, ke ni havas ideojn ĝeneralajn kaj pure spiritajn. Ni ja ekkonas ne nur tiun ĉi homon, tiun ĉi kreskaĵon, tiun ĉi ŝtonon, sed ankaŭ ni ekkonas la homon, la kreskaĵon, la ŝtonon ĝenerale. Ĉu vi renkontis tiujn ĝeneralajn ideojn ĉe la bestoj?

Ni ankaŭ ekkonas la pure spiritajn objektojn, ekzemple: oficon, devon, leĝon, moralecon, veron, bonon, liberecon, religion, spiriton, Dion. Ĉu vi trovos tiujn ideojn ĉe la bestoj? Ĉu ia materio povas leviĝi al la ekono de tiuj ideoj? Sed la homo povas tion ĉi. Estas do en li io nemateria, kio ekkonas la nemateriaĵojn.

b) La homo povas ankaŭ ekpreni la internan, pure logikan rilaton inter du ideoj aŭ inter du opinioj, li do povas opinii kaj argumenti. Sed tiu logika rilato estas io pure spirita, ne havanta la materian ekzistadon; ĝi pli ol la ideo ne estas materie ekvidebla. Ekzistas en la homo la principo, kiu ekkonas tiajn objektojn, kiuj per la sentilaj povoj ne estas ekkoneblaj. Tiu principo necese estas

spirita, ĉar certe ĝi ne estas materia. Kaj tiu principo ne estas io alia, ol la homa animo. Ĝi do estas estaĵo nemateria, spirita.

c) Ankaŭ la homa animo estas ekkonebla. Ĝi povas vidi sin mem per reflektado. Kaj nenio materia povas vidi sin mem. Ĉu la papero vidas tion, kio estas skribite sur ĝi? Ĉu la spegulo respeguligas sin? Kaj la animo, kiu sin mem rigardas, havas tute alian naturon, ol la materio. La animo devas do esti spirita.

d) Ekzistas do nepleniga distanco inter la homa kaj besta animoj. Sole al la homo apartenas la parolo, progreso, moraleco, religio. Ĉe la bestoj ne povas ekzisti tiuj aparaĵoj, ĉar ili ne pensas kaj ne konkludas; ili nenion ekkonas, kio estas spirita.

e) Fine, oni scias, ke en la homa korpo dum apartaj sepjaroj fariĝas tuta transformiĝo de la materio. Malgraŭ tiuj ŝanĝoj en la korpo, ne ŝanĝiĝas la homa «mi». Se estus alie, ni nenion memorus dum nia maljuneco el nia juneco. Sed ni ĉiam nin sentas la sama persono dum la tuta vivo. Nu, tiu «mi», kiu ne ŝanĝiĝas, ne estas materio, sed la animo. Ekzistas sekve en ni la nemateria principo, nomata animo, kiu pensas, argumentas, reflektas, komprenas, konkludas; ĝi estas fon-

to, fundamento de nia intelekta agado.

3. La atesto de la homa volo

a) La homa volo povas tute ne rompiĝi de la materiaj fortoj. La homo povas toleri eĉ la plej grandajn turmentojn, kaj se li mem ne volas, neniu lin devigos, ke li konsentu la fremdan volon. Tio ĉi pravas, ke ekzistas en la homo ia principo, kiun nenia materia forto, eĉ de la tuta mondo, povas superforti. Certe tiu principo estas nemateria, spirita, ĉar se ĝi estus materia, ĝi devus laŭ fizikaj leĝoj necese subiĝi al la pli granda forto materia. Vidu la katolikajn martirojn, kiuj dum plej grandaj turmentoj restis fidelaj al Jesuo Kristo.

b) La homa volo deziras la nemateriaĵojn, ekzemple scion, virton, gloron, ktp. Por akiri tiujn bonojn, la homo seniĝas ofte de la materialaj bonaĵoj, dediĉas la sanon, vivon, toleras turmentojn. Ĉu tio ĉi estus ebla, se ne ekzistus en la homo pli alta principo, ol la materio?

Rezultas, ke la homo havas nematerian, spiritan animon.

Kontraŭ tiu rezulto nenion signifas ĉiuj riproĉoj, ĉar *contra factum nullum argumentum*: kontraŭ fakto neniu argumento valoras.

II. La homa animo havas liberan volon

1. Libera volo estas povo libere elekti inter unu kaj alia ago. Ĉu tiu libera elekto ekzistas en la homo? Ni pripensu.

2. La Sankta Skribo. - Se la homo ne estus libera kaj ne povus meriti la ĉielon, jen Jesuo Kristo, Dio la plej saĝa kaj ĉion sciante, ne dirus pri la kolektado de la meritoj por la eterna vivo. Sed Li diris: Ne provizu al vi trezorojn sur la tero, kie tineo kaj rusto konsumas, kaj kie ŝtelistoj trafosas kaj ŝtelas; sed provizu al vi trezorojn en la ĉielo, kie nek tineo nek rusto konsumas, kaj kie ŝtelistoj nek trafosas, nek ŝtelas. (Mat 6, 19-20)

Kaj al la junulo, demandanta, kion fari, por atingi ĉielon, respondis Jesuo Kristo: Se vi volas eniri en la vivon, konservu la ordonojn.

Benita estas tiu, kiu povis peki, kaj ne pekis, malbone agi, kaj ne agis (Ecclesiasticus 31, 10). Dum la lasta juĝo premioj Dio la homojn por iliaj libervolaj agoj de la mizerikordo. (Mat 25, 36)

3. La Katolika Eklezio dum la Trienta Koncilio definis dogme pri la libera volo de la homo. Ĉiam ĝi invitas al la plenumado de la bonaj agoj, kaj evitado de la malbonaj agoj; ĝi do instruas, ke niaj agoj, ĉu bonaj, ĉu malbonaj, estas liberaj.

4. Ne ekzistas en la mondo ia bono, kiun la volo necese dezirus; ĉar ĉiuj mondaj bonoj estas malperfektaj. Se ĝi do ion deziras, certe libere.

5. Ni konscias, ke certaj agoj en ni estas necesaj (ne dependas de ni, ekzemple la kap-

doloro, la morbo de la stomako) kaj aliaj estas liberaj (ekzemple la preĝo, la almozo).

6. La tuta homaro estas konvinkita pri la libera volo de la homo. Kiel oni povus imagi al si respondecon por la agoj, la ordonoj kaj malpermesoj, la laŭdoj kaj mallaŭdoj, la premioj kaj punoj, kaj aliaj, se la homa volo ne estus libera?

7. Se oni komprenas la spiritecon de la homa animo, jam ne estas necese pruvi nian demandon, ĉar la spirito ne estas imagebla

sen la libereco.

Estas fakto, ke la homa volo povas esti limigita aŭ eĉ senigita de la libereco pro la kaŭzoj eksteraj, sed el tio ĉi ne rezultas, ke ĝi nature ne estas libera. La malordo en la korpo influas je la homa animo, tamen restas fakto, ke en la sana korpo estas sana spirito, kaj sekve libere aganta volo. Ĉiuj riproĉoj ne eltenas la kritikon. Tial eĉ ni ne tuŝas ilin. Kiu volas, tiu amuzu, sed por la bona volo sufiĉas niaj supre cititaj argumentoj.

III. La homa animo estas nemortebla

1. La nemortebleco de la homa animo signifas, ke la homa animo ekzistos eterne kaj ĝi nek mem pereos, nek Dio ĝin neniigos.

2. Jen la dogmo de la neerarebla katolika Eklezio. Kontraŭe la instruado pri la eterneco ne estus prava.

3. Sinjoro Jesuo diras, ke la homa animo ne estas pereigebla. Al la pentanta krimulo Li diras, ke li estos la saman tagon kun Li en la paradizo. Kial? Ĉar la animo de la krimulo vivos post lia morto. Pri la diboĉa riĉulo diras Jesuo, ke li tuj post la morto estis entombigita en la Infero, kaj la almuzulo suferanta estis portita de la anĝeloj sur la sinon de Abraham. La animoj do de ambaŭ vivis post morto kaj ricevis la merititan pagon.

4. La homa animo havas estadon sendependan de la korpo kaj havas siajn proprajn agojn, krom tio ĝi estas nemateria kaj ne konsistas el partoj. Tial ĝi povas perei sekve

de la morto de la korpo aŭ post la disiĝo de la korpo.

5. La dezirojn al bono, vero, feliĉo ni portas kun la naturo en la mondon, sed tie ĉi ni ilin neniam satigos. Dia saĝeco kaj boneco ne permesos, ke ili ne estu satigitaj. La homa animo devas do eterne vivi.

6. Dia justeco devas premii la suferantajn bonulojn kaj puni la malbonulojn riĉajn je bonaĵoj. Sur la tero ne efikiĝas la justeco. La homa animo devas do vivi post morto de la korpo.

7. Ĉiuj popoloj kredis kaj kredas je la nemortebleco de la animo. Ni ne intencas citi multajn ekzemplojn. Nur la fieruloj aŭ diboĉuloj serĉas por si kontraŭajn argumentojn. Tamen la veron ili ne detruos.

8. Sole Dio povus neniigi la homan animon, sed Li ne faros tion, ĉar Li estas saĝa bona kaj justa.

Sekvoj

Se la homo devas vivi eterne - kaj certe li vivos - do la vivo ne estas amuzaĵo kaj bagatelaĵo. Ne la subjektivismo, sed la vero savos nin. La vivo sur la tero estas vojaĝo al la eterneco.

Sed ne sufiĉas la pure natura vivo. Ni devas havi en ni la plej altan vivon, supernaturan, kiu nin faros taŭgaj vidi Dion „vizaĝo kontraŭ vizaĝo“. Tiu ĉi supernatura vivo komenciĝas en ni per la sakramento de la bapto kaj daŭras per aliaj sakramentoj. Sen

la Krista religio neniui akirus tiun supernaturan vivon kaj ne estos feliĉa en la eterneco. La celo de la homo estas supernatura, same la rimedoj devas esti supernaturaj. Sed tiuj rimedoj troviĝas nur en la vera religio kaj Eklezio, nome la katolika. Kiu volas esti feliĉa en la eterneco, tiu devas necese esti katolika dum la surtera vivo. *Sapienti sat!* ■

*Jakob Makara, pastro
(El Espero Katolika n-ro 52 el la jaro 1929)*